

# ESPERANTO



# EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA

15-a jaro, n-ro 43(2021:2)

*Karaj legantoj,*

*Ni uzas ĉi tiun okazon de la apero de la nova numero de la bulteno por refoje deziri bonajn farton, sanon kaj pacon al vi ĉiuj.*

*Rigarde al la evoluo de la aferoj, la maltrankviloj lige al la korona viruso ne tute jam malantaŭas nin. En pluraj regionoj homoj ankoraŭ vivas sub ĝislimigoj, malpermeso pri granda fizika grupiĝo, malpermeso manpremi por la kutimaj salutoj...*

*Spite de tio, la afrika kolegaro – ĉu unuope, ĉu komune – en la laboro por Esperanto en sia hejmkontinento ne rezignas. Konstante aperas ie iuj etaj atingoj, pri kiuj ĉiam ni fieras. Bonvolu do mem malkovri tiujn etajn sukcesojn, kiujn ni ĝojas konigi al vi per tiu ĉi nova numero de la bulteno. Vi povas de tempo al tempo ricevi rekte ankaŭ informojn ĝustatempe pri progresetoj en Afriko per ĝiaj sociaj retpaĝoj kaj komuniklistoj. Esploru pri tiuj afrikaj retlistoj kaj aliĝu al ili!*

*Danke al vi ĉiuj, al ĉies subtenoj la verda afero moviĝas ankaŭ en la kontinento. Sincerajn dankojn al vi ĉiuj kaj specialajn pensojn al vi, kiuj estis trafitaj de la malsano de kovim-19. Plenan resaniĝon al vi!*

*La redakcio*

\*\*\*\*\*

## 8-a Afrika Kongreso 2022: Senegalio tenas la torĉon

Membroj de Senegala E-Asocio (SEA) kunvenis kaj diskutis precipe pri la okazigo de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) okazonta surloke la sekvan jaron, dimanĉe la 2-an de majo 2021 en Rufisko.

La renkontiĝo komenciĝis je la 16-a horo kaj duono kun la ĉeesta partopreno de gesinjoroj Lafi Charles Diatta (kasisto de SEA), Antoine Gomis (sekretario) kaj kelkaj novaj membroj kiel Fary Niang, ĵurnalisto ĉe la naciaj radiostacio kaj televido. Li estis la honora gasto dum la kunveno.

Per viva prezento s-ro Lafi klarigis pri la historio de nia lingvo. Dum sia interveno li emfazis la idealojn de la internacia lingvo. Poste sekvis respondoj respektive de s-roj Lafi, Antoine Gomis kaj Assane Faye al la levitaj demandoj de la honora gasto pri la lingvo. Oni ankaŭ interŝanĝis ideojn pri strategio disvasti pli efike la lingvon tra la tuta Senegalio.

Rilate al la precipa ero de la tagordo, nome



8-a Afrika Kongreso de Esperanto



**De la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022  
Thiès, Senegalio.**

la pretiglaboroj kadre de la 8-a AKE, post viglaj interdiskutoj, estis decidite, ke la kongreso okazos en Thiès, urbo staranta je kelkaj kilometroj de la ĉefurbo Dakaro. Interkonsente kun la Afrika Komisiono de UEA, la

kongresa dato estas fiksita inter la 26-a kaj la 30-a de decembro 2022. La loka organiza teamo provizora (aliaj membroj poste aldoniĝos) konsistas el prezidanto: Assane Faye, sekretario: Antoine Gomis, respondeculo pri financoj: Lafi Charles Diatta. Jen kio fermis la kunvenon je la 18-a horo.

Menciindas, tamen ke la Afrika Kongreso de Esperanto estas ĉiu-trijara renkontiĝo en la kontinenta Esperantujo. Ĝin organizas la Afrika Komisiono en kunlaboro kun grupo de aktivaj esperantistoj laŭvice en malsama regiono sur la kontinento, sub la egido de UEA.

La 8-a AKE estos interesa kaj historia renkontiĝo en Senegal, ĉar neniam antaŭe okazis Esperanto-kongreso en la lando. SEA nuntempe funkcias per 25 aktivaj membroj, el kiuj 9 estas individuaj membroj de UEA por la kuranta jaro. Eblas jam imagi la kreskon de la SEA-membroj pro la kongreso kaj rilataj aktivajoj.



Ĉiu eta mondonaco kiel subteno al la kongreso al la konto *Afriko* ĉe UEA kun indiko *por la 8-a AKE* estas tre bonvena kaj dankata. Donacoj kaj la aliĝkotizoj (kotiztabelo baldaŭ pretos) helpas al la organizantoj realigi sukcesan kongreson kaj subvencii la partoprenon al la kongreso de afrikaj gejunuloj, kiuj aktivigas por Esperanto, tamen ne havas la monrimedojn, ĉeesti ĝin.

**Antoine, Assane**

## Esperanto Plus, nova faka asocio de UEA

Tio sekvis el la oficialaj rezultoj publikigitaj (41 jes, 3 sindetenoj kaj 0 ne) de la Ĝenerala sekretario de UEA, Aleks Kadar, pri la komitata voĉdonado rilate al la proponita kunlabora kontrakto inter la nova faka asocio Esperanto Plus kaj UEA, la 15-an de aprilo 2021.

De antaŭ pli ol dek jaroj la nova faka asocio de UEA helpas en la disvastigado de Esperanto precipe en Afriko per subtenkotizoj, donacoj de siaj membroj. Konkrete, la asocio dank' al solidarecaj rilatoj kreas, kunigas grupojn da subtenantoj por subteni unuopajn afrikajn eistojn, kiuj dediĉas sin al Esperanto-aktivajoj. Kotizante po 10 eŭrojn monate en grupo de 15 personoj, la E-Plusanoj havigas monrimedon al iu afrika esperantisto por efike disvastigadi la

la lingvon, en sia regiono. Entute 6 e-istaj en DR Kongo, Madagaskaro, Tanzanio, Togolando estas nun subtenataj de la nova faka asocio.

La statuso de nova faka asocio de UEA estas grava atingo el la vidpunkto de seriozeco kaj fidindeco, tio estas ankaŭ okazo por plue elpaŝi kaj alvoki por pli vasta kaj fruktdona kunagado de grandanimaj esperantistoj favore al la valorigo de afrikaj talentoj per Esperanto en la kontinento. *Ni ja esperas ke tiu nova fenestro sur la mondon sukcesos allogi novajn subtenontojn, por kompletigi la nombrojn de personoj en la jam ekzistantaj subtengrupoj, kaj krei novajn. Por tion fari ni bezonas ĉiujn kompetentecojn viajn por disvastigi la informojn, komuniki kun niaj afrikaj amikoj por vigligi nian novan fakan asocion, skribis Evelyne Rotellini.*

Esperanto Plus estas asocio formale fondita laŭ la franca leĝo la 29-an de junio 2013. Ĝi havas ankaŭ konton ĉe UEA al kiu eblas monĝiri "epls-g". Por subteni la celon de la asocio aŭ aniĝi: [https://uea.org/fakoj/Solidarecaj\\_rilatoj](https://uea.org/fakoj/Solidarecaj_rilatoj) aŭ <https://esperantoplus.jimdofree.com>.



## Nova afrika albumo, frukto de transkontinenta kunlaboro

Téophile Mayoma Diankembo: *MARta kaj JOmo kantas MAYOMA -n*. Kinŝaso, DR Kongo, 2021. Miksado kaj mastrigado: Vinilkosmo. 6 titoloj - 19:00 mn, disponebla laŭ MP3 - 320 Kb/s - OGG - FLAC - elsendflujaj formatoj. [6 EUR, ĉe Mayoma-JoMo/Vinilkosmo].

La 30-an de aprilo 2021 eldoniĝis nova bita sonregistraĵo de la konga e-isto kaj kantisto Téophile Mayoma Diankembo. Temas pri ses-titola albumeto en Esperanto kaj lingala (unu el la kongaj lingvoj), frukto de tipe Esperanta kunlaboro inter Mayoma, kiu loĝas en Kinŝaso, DR Kongo, kaj gemuzikistoj-kantistoj de Tuluzo, Francio. Amo, perforto, maljusteco estas kelkaj el la temoj traktitaj en la albumo sub rege-, kantr- kaj popstila sono.

Mayoma estas verkisto-komponisto kaj muzikisto. Li komencis muzikumi en 1985 kaj havas 2 albumojn. La nomo de la albumo *MARta kaj JOmo kantas MAYOMA-n* estas certe por omaĝi la sukcesan transkontinentan kunlaboron inter li, jOmO kaj Marta Juliá, kio bele ilustras la idealon de Esperanto.

Antaŭ dek unu jaroj jam Mayoma kaj jOmO kunlaboris por la vinilkosma albumo *Mayoma kaj jOmO afrikumas*. Kiel sur la antaŭa albumo, oni povas aŭskulti ankaŭ sur la nova unu komponaĵon de jOmO, sed ĉi-foje kun nur ritmo kaj voĉoj. Krome, sur la sama nova albumo estas ankaŭ la bela kaj harmonia ina voĉo de la nova juna kantistino Marta.

La riĉigo de la Esperanta kulturo per aspektoj de la afrikaj elementoj dependas de la kunlaboro de talentoj, sed ankaŭ de la subteno de ceteraj esperantistoj. Aĉeti do muzikaĵojn de



Mayoma aŭ subteni lin donace al lia konto "dmay-f" ĉe UEA, povas nur provizi lin per rimedoj por pli efike helpi disvastigi la verdan lingvon siamaniere.

Ĉiuj pecoj de la albumo t.e. *Diru al mi la veron; Mi suferas por ami vin; Mirejla; La usonaj nigruloj; Venu mi amas vin kaj Mi revenos/ Nakozonga* estas prov-aŭskulteblaj per <https://mallonge.net/du>.

[La Redakcio]



## Internacia Tago de virinoj marte 2021...

Multaj eventoj kaj manifestacioj estis organizitaj de movadoj kaj asocioj tra la mondo por celebri la venkojn kaj atingojn rilate virinajn rajtojn, sed ankaŭ por aŭdigi postulojn por plibonigo de la situacio de virinoj.

En Afriko kelkaj virinaj esperantistoj en siaj respektivaj hejmlandoj memoris la Tagon, ĉu en ordinaraj virinaj organizaĵoj, ĉu en Esperanto-asocio.

### ...en DR Kongo...

La grupo EVA-DRK organizis konferencon sub la temo *Virino en la socio* en la ĉefurbo Kinŝaso. Tri virinoj faris prezentaĵojn: fraŭlino Oriane parolis pri la graveco de virinoj en la socio; la kuracistino Tania parolis pri korona viruso kaj Alexandrine OMBA laste parolis pri virino kaj lingvoj. La etoso estis bona, kelkaj virinoj decidis lerni Esperanton.

En la alia urbego de DR Kongo, nome Goma, tieaj esperantistinoj, kiel kutime, ankaŭ siamaniere celebris la Virinan Tagon, la 14-an de marto 2021.



### ...kaj en Madagaskaro

Ni organizis la 08-an de marto tradician dancspektaklon kun aliaj virinaj asocioj. Samtage vespere okazis ankaŭ virtuala renkontiĝo de virinoj, dum kiu ni interŝanĝis pri inaj rajtoj kaj situacioj en kelkaj afrikaj landoj. 7 personoj el Germanujo, Hispano, Ĉinio, Francujo kaj Madagaskaro virtuale partoprenis la kunvenon. Merkrede, la 10-an de marto ni iris vizite disdoni manĝaĵojn en la urbo Moramanga al 657 gemalliberuloj, el kiuj estis 25 virinoj.

Entute afrikaj esperantistinoj streĉis siajn fortojn por diskonigi Esperanton per kursetoj, kunlaborado kun aliaj virinaj organizoj kaj instruado pri ekstermovadaj aferoj.

Nova sesio de Esperanto-kurso komenciĝis per *Whatsapp* la 2-an de la pasinta aprilo. EVA-DRK kunlaboras kun aliaj virinaj asocioj, kiuj ne uzas Esperanton por siaj aktivadoj.



**Raveloharison Mioranantenaina**  
*rmlvmiro@yahoo.fr*  
Tel. : +261 34 10 059 94

## Esperanto-kulturo: ankoraŭ afrika kontribuo

**Dankon Kwibe: *La heredaĵo*. Miriadanoj Filmo, Burundo, aprile 2021. 30-minuta HD-filmo. [Senpage spekteblas, per : [https://www.youtube.com/watch?v=hX097I5C\\_k](https://www.youtube.com/watch?v=hX097I5C_k)]**

*La heredaĵo* estas nova filmo realigita de la kongano Dankon Kwibe en du partoj. La unua parto estas anoncita al la e-ista publiko la 20-an de aprilo 2021. Estas filmo, kiu montras konkretajn problemojn, kiel edziĝo kun la vidvino de la frato, postuloj de la socio rigarde al viroj kaj "favoroj" al virinoj. Mallonge, la filmo prezentas enigardon pri kelkaj tradiciaj praktikoj, kiuj bremsas aŭ mal-kuraĝigas homojn en la procezo de virina emancipiĝo en Afriko.

Kwibe, la ĉefa rolulo, post la morto de la frato edziĝis kun ties edzino laŭ lokaj tradiciaj kutimoj kaj tiel heredis la bonhavaĵojn de la mortinto. La juna paro dediĉis sin al trankvila familia vivo sufiĉe plena de reciproka amo. Ĉiutage la edzino dommastrumas, prizorgas la infanojn kaj preparas la revenon de la edzo, kiu iras labori, ĝis iam ĉio ŝanĝiĝis: la edzo decidis havi duan edzinon...

Temas pri interesa, pensiga filmo realigita en afrika etoso kun subtekstoj en la angla lingvo. Malgraŭ malbona prononcmansiero de



kelkaj aktoroj, ŝokaj paroloj kaj agoj ĉe la film-fino – kio donas impreson pri manko de respekto al virino – la kinaĵo estas vere spektinda, tiom pli ke, la rezulto teknike estas imprese bonkvalita kaj la roluloj tre elturniĝemaj kun limigitaj rimedoj.

Kwibe kaj liaj kolegoj meritas kuraĝigon per ŝato pri ilia filmo kaj krom tio, ankaŭ subtenon precipe por povi en mallonga periodo realigi en bonaj kondiĉoj la duan parton de sia projekto.

Adjévi Adjé

## Bezono pri lerno- kaj legomaterialoj en Madagaskaro

Mi komencis instrui Esperanton al 9 tre junaj gelnantoj. Ili estas en mia duagrada lernejo kaj entuziasme lernas Esperanton ĉiulunde dum horo kaj tio ĝis la fino de julio 2021.

Mi estos tre danka se vi povos helpi al mi pli facile havigi esperantlingvajn legaĵojn, kiel romanojn, instrumaterialojn (*Gerda malaperis, Verda Koro, Karlo...*) kaj aliajn lernolibrojn.

Mi scias ke ekzistas PDF-formato de multaj libroj, sed ebleco printi ilin ankoraŭ estas tute alia afero en Madagaskaro, kaj fizikaj libroj estas praktike pli allogaj. Mi volas kuraĝigi miajn gekursanojn legi paperajn librojn.

Rafanomezantsoa Fafah  
[fafahrayan@gmail.com](mailto:fafahrayan@gmail.com)

E-Klubo Sunleviĝo de Moramanga



## Afrikaj e-istoj kun kovim-19, atestoj de infektitoj

Kovim-19 estas realaĵo, mi suferis pro ĝi, sed resaniĝis danke al Dio. Komence pro mensogoj de nia registaro kaj malfido de civitanoj oni antaŭe dubis pri la ekzisto de la korona viruso. Estis multaj misinformoj, tamen mi same kiel aliaj niĝerianoj sekvis ĝisdatigojn de la internaciaj amaskomunikoj pri la viruso.

Mia unuenaskita filo 16-jara unue malsaniĝis. Li havis malvarmumon, malfacilon spiri, febron, malfortiĝon ktp. Post konsultiĝo kun kuracisto konfirmiĝis, ke li suferas pro korona viruso, do necesis tuj kvaranteniĝi mian filon. Malfacilis izoli propran infanon, studenton hejme... Konataj flegistinoj en Usono tamen telefone konsilis al ni trankviliĝi, ke homoj foje resaniĝas nature post kelkaj tagoj. Oni preskribis vitaminon C, *Zithromax*, *hydrozyl chloroquine* ktp por li. Ĉar ni ja opinias, ke *hydroxy de chloroquine* estas danĝera, ni ne uzis ĝin. Ni uzis krome lokajn kuracherbojn preparitajn surbaze de citrono, ajlo, zingibro, mielo...

Post preskaŭ semajno mia filo resaniĝis, sed mi kaj la dua filo 14-jara komencis havi similajn sanproblemojn. Mia dua filo simile rapide resaniĝis, dum mi suferis la malsanon dum preskaŭ monato. Mi uzadis tiun lokan tizanon krom *Zithromax* vitamin C ktp. Mi sunumis min kaj ofte iris arbaren por spiri freŝan aeron, kvankvam dum tiu periodo mi povis flari nenion. Poste, laŭgrade revenis mia odorsenso.

Du el miaj kuzoj bedaŭrinde mortis pro korona viruso, ĉar ambaŭ havis diabeton. Ĝenerale en Niĝerio homoj preferis uzi naturajn kuracajn rimedojn por resaniĝi. Oni manĝis multe da fruktoj kaj legomoj kun vitaminoj. Ni ĉiuj flegiĝis hejme. Fakte plejparto de la infektitoj ne volis iri al hospitalo, nek al la publika kvarantejo, ĉar oni timis ke tie ni estos lasitaj al ni mem.



Prince Henry OguinyeOzoemena

Mi sentis doloron ĉe miaj kruroj kvazaŭ mi estus piedirinta dum longaj horoj la 31-an de marto 2021. Ankaŭ mia brusto ekdoloris. La doloro pliiĝis forte tutan nokton tiel ke tagiĝo ŝajnis eterna. Fine ni povis viziti frumatene privatan kuraciston. Ne estis testo de kovim-19 en mia loĝurbo Moramanga, tamen la kuracisto, post diagnozo, diris ke verŝajne mi havas kovimon. Li preskribis multajn kuracilojn: Azitromycine, Vitaminon C, Magnesium, kontraŭdoloran medikamenton ktp. Preninte la kuracilojn, mi sentis min iom pli bone ol antaŭe.

Posttagmeze, mi iomete ordigis mian ĉambron kaj mi preskaŭ tuj laciĝis. La postan tagon mi estis tre malforta kaj volis manĝi nenion. Dimanĉe, mi ne povis iri al la preĝejo kvankam estis la Paskotago. Mi tute ne sentis min bone kaj preskaŭ ne povis spiri. Miaj muskoloj tre ekrigidiĝis, mi ne plu povis movi miajn manojn, gambojn, nek miajn lipojn kaj miaj voĉo kaj paroloj tiun momenton fariĝis apenaŭ komprenataj kaj aŭdeblaj. Kelkan momenton poste mi senkonsciiĝis.

Ni ne havas aŭton kaj ambulancon posedas nur publikaj hospitaloj. Mi ne volis iri al la publika hospitalo, des pli ke la servoj tie ĝenerale plejeble malbonas. Mia edzo iris serĉi "Tuk-tuk", taksio-transportilon. Pluvegis tiun tagon, kaj mi iom malsekiĝis ĝis la tuk-tuk.

Alveninte ĉe la kuracisto, mi denove havis la saman krizon. Mi ricevis intravejnajn medikamentojn du horojn kaj poste revenis hejmen. Flegistino venis ĉiumatene en la domon por flegi min. Mi povis manĝi nenion, mi tre malbone dormis, la brustodoloro ankoraŭ estis tre forta.



Mi denove serioze malsaniĝis. Mi sentis tre fortan malvarmon kaj multe tremis. Oni metis botelon da varma akvo sur mian dorson kaj miajn piedojn, sed mi ankoraŭ malvarmiĝis ĝisoste. Mia edzo fine vokis ambulancon. Mi estis transportita en hospitalurĝejon. Neniam antaŭe mi estis tiel malsana en mia vivo. Mi povis elekti, ĉu esti flegata hejme aŭ en hospitalo post 4-hora enhospitaliĝo. Evidente mi preferis reveni hejmen, kie flegistino venis tri fojojn tage. Mi ricevis intravejnajn medikamentojn 24h/24h. Mi daŭre ne sentis min bone, mi tute perdis mian flaran kapablon kaj manĝoj ŝajnis komplete sengustaj por mi.

Ĉ. du semajnojn poste mi iom pli resaniĝis, sed ankoraŭ iom perdis fortojn kaj tre facile laciĝis. Mi multe tuis kaj tute ne plu povis

trinki malvarman akvon kaj duŝi min per malvarma akvo. Mia familio ĉiam devis surmeti maskon, ĉiu tre ofte lavis siajn manojn. Ni tre malofte iris eksteren, ni restis hejme krom mia edzo, kiu estas vendisto. Li respektis ĉiujn malpermesojn, sed li iele ricevis la viruson.

Li unue plendis pri kapdoloro kaj ne flaris odoron. Li tuj ricevis medikamentojn de la kuracisto kaj iom pli rapide ol mi resaniĝis.

Kovim-19 vere ekzistas kaj ĉiuj devas singardemi, ĉar temas pri virulenta kaj danĝera malsano. Mia familio devis elspezi preskaŭ tutan monatan laborsalajron por flegiĝi. Kuraciloj kontraŭ la malsano ege multekostas kaj foje ne haveblas surloke.

**Rafanomezantsoa Fafah**  
(Madagaskaro)

## Togolando renovigas per ĉeesta kunveno

Tri-hora fizika renkontiĝo kunigis junajn kaj malnovajn togolandajn e-istojn en la ĝardeno de la kuturdomo de Be en Lomeo, Togolando, koncerne la nacian Esperanto-movadon, sub organizo de Adjévi Adjé, la 13-an de februaro 2021.

Ĉeestis fizike 7 personoj kaj virtuale 3 por enfokusigi la punktojn de la tagordo.

La unua, grava por ĉiuj, estis rakontoj pri sperto el la organizo de la 73-a Internacia Junulara Kongreso 2017 en Togolando. Unanima konstato estis, ke afrikaj esperantistoj povis lige al IJK vojaĝi kaj havi pli proksiman kompanion kun samaĝuloj el diversaj kulturaj horizontoj. Tion ili ne estus povintaj fari sen la aŭdacemo kaj persistemo de la organizintoj.

En la fokuso de la kunveno estis plia grava punkto: la nuna etoso en la togolanda Esperantomovado kaj kiel transiri ĝin. Ĉiu povis analize esprimi siajn opiniojn pri tio kio estas pliboniginda kaj eĉ ŝanĝenda por plupaŝi al la komuna celo serene. Tre dezirinda estas revigligo de la movado kun tiuj, kiuj pretas libere kunlabori. Aprezita estas ankaŭ la ideo ligi Esperantumadon al enspeziga aktivaĵo, des pli ke movadoj kiuj ne kreas monricevon preskaŭ interesas neniun nun. Aliaj levitaj kaj akceptitaj ideoj estas regula aranĝo de babilrenkontiĝoj, kreo de sistemo pri interhelpado de movadanoj,



klerigejo, kie homoj el la tuta mondo povas staĝumi, ricevi kaj doni lertigon pri praktikaj aferojn.

Meze de refreŝigaĵoj pagitaj de du kunvenintoj por ĉiuj, Raoul Hounnake rakontis pri la bona etoso, kiu iam regis en la nacia movado kiam li estis ankoraŭ juna kaj aktiva esperantisto. Liaj diroj instigis pli ol unu en la klopodoj por la revenigo de la tiama dinamismo en la movado.

Kunvenintoj montris vervan deziron partopreni en la 54-a ILEI-Kongreso, okazonta en la benina ekonomia ĉefurbo la duan semajnon de la venonta aŭgusto. La kunveno finiĝis per liberaj interamikaj babiladoj kaj diskutoj.

**Kossi Gadoufia Edah**

## Forpasis Batangu Mpesa, prezidanto de la konga E-asocio

La 5-an de marto 2021. Li naskiĝis en la konga vilaĝo Yenne-Kilanda la 4-an de novembro 1942. Patro de 6 gefiloj, li esperantistiĝis en 2015 kaj de tiam elstare kontribuis al la Demokrata-Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA), per verkado kaj tradukado kaj per redaktora kaj eldonista laboroj.

Batangu multe tradukis kaj verkis en Esperanto. Kelkaj el liaj titoloj estas: *Esperanto mu Kikongo* (E-lernolibro per Kikongo); *Kontraŭ plasmodiaj plantoj* (rilate al plantoj kontraŭplasmodiaj); *Leksiko E-Klist* (Leksiko Esperanto-Kikongo- Lingala-Tshiluba); *El konga saĝumo* (rakontoj); *Sendependeco* (kompilo de diversaj nacilingvaj paroladoj kadre de la sendependiĝo de DR Kongo en 1960). Li estis ankaŭ la iniciatinto kaj ĉefredaktoro de la kvarmonata periodaĵo *Vekiĝo* de DKEA. Unu el liaj lastaj tradukitaj laboraĵoj kaj eldonaĵoj en Esperanto estas la libro *Historio de la Profeto Simon Kimbangu*, al kio li dediĉis preskaŭ jaron.

Malavare Batangu donacis finance al la nacia E-movado. Inter 2015 – 2020 li estis la precipa mecenato de la asocio, kies 6-a prezidanto li iĝis en 2018. Batangu i.a. oferis al DKEA sidejon en sia granda konstruaĵo sur la ĉefa strato *By-Pass*, kie estis organizitaj pluraj E-renkontiĝoj, nome klubkunvenoj, estrarkunvenoj, Ĝeneralaj Asembleoj, AMO-seminario, Zamenhof-Tagoj kaj eĉ la unua nacia kongreso en 2017. Li ankaŭ financis la tutan eldonon de *Vekiĝo*.

Liaj kontribuoj ekster la E-movado estis

same riĉaj kaj kolose impresaj. Diplomito de la montreala universitato pri farmaciaj sciencoj, li estis esploristo, administranto 1990

–2013 de la publika universitato de Kongo. Li fondis, kunfondis esplorcentrojn kaj membris en pluraj fakaj asocioj, i.a. la nacia asocio de farmaciistoj, kaj 1976–1977 estis ĝia prezidanto, Nacia Konsilio de Ordo de Farmaciistoj, kies prezidanto li estis 2013–2018. Batangu Mpesa malkovris multajn rimedojn kontraŭ diversaj malsanoj, pri kio li ricevis plurajn premiojn. Multaj el liaj malkovraĵoj estas grandskale konataj i.a. *Zengaver* (vermifugo); *Manadiar* (kontraŭ diareo); *Makindangolo* (korfortigilo); *Manalaria* kaj lastatempe *Manacovid*, konga molekulo kontraŭ kovim-19, ĵus aprobita kaj ricevinta surmerkatan rajtigon de la Sanministerio, atendante la saman aliron de Monda Organizo pri Sano. Batangu estis ankaŭ deputito 1987–1997 kaj 2003–2006.

Entute Batangu valore kontribuis al la utilo de la homaro. Tion aparte ilustris pluvoj de kondolencaj kaj omaĝaj mesaĝoj de diversaj teranguloj, tuj post la anonco de lia morto. La forpaso de Batangu estas tre grava perdo ne nur por la familianoj, sed ankaŭ por la konga Esperantujo kaj la tuta DR Kongo. Afriko funebras kune kun familianoj kaj amikoj de Batangu kaj kun la tuta konga esperantistaro.

Florent Ntoto

**Esperanto en Afriko** estas trimonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperantomovado en Afriko.

**Redaktis:** Adjévi Adjé,  
06 B.P. 61807, Lomé, Togolando;  
tel.: +228 902 57 549, 995 72 623.

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: [adjevia@gmail.com](mailto:adjevia@gmail.com).

Limdato por la 44-a n-ro: la 30-a de julio 2021.

**Membroj de la Afrika Komisiono de UEA (2019-2022):**

D-ro Byelongo Elisée Isheloke, **Sudafriko**  
S-ro Gilbert Niyukuri, **Burundo**  
S-ino Miora Raveloharison, **Madagaskaro**  
S-ro Joel Muhire Ndaziboneye, **DR Kongo**  
S-ro Moses Gbetogo Opa, **Niĝerio**  
S-ro Viktor Ntonto, **Kameruno**  
S-ro Adjévi Adjé, **Togolando**  
S-ro Cedrick Irakoze, **Kenjo**

Pli da informoj rilate al la afrika movado haveblas per:  
[www.esperanto-afriko.org](http://www.esperanto-afriko.org).